estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 172 Aŭgusto 2000

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto


Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas $8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas $15


☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆


## Revenu Al Nova Scotio



En la lasta numero ni invitis vin viziti nian provincon, kaj ni skizis kelkajn el la allogaĵoj sperteblaj dum la somero. Ĉi-monate ni daŭru tian superrigardon de nia regiono kun trarigardo de kelkaj el la eventoj kiuj okazos dum ĉi tiu somero en Nova Skotio.

La plej granda kaj plej impona evento de ĉi tiu somero jam okazis inter la 19a kaj 24a de julio, kiam ĉirkaŭ 80 velŝipoj (ankaŭ konataj kiel „altaj ŝipoj") de diversaj grandoj vizitis la ĉefurbon, Halifakso. La velŝipoj partoprenis eventon organizitan de la Internacia Vel-Trejnada Asocio (ISTA) sub la aŭspicioj de la Vel-Trejnada Asocio (STA). Tiu estas brite bazita karitata organizaĵo dediĉita al la antaŭenigo de persona disvolviĝo de junuloj per vel-trejnada sperto en altaj ŝipoj. „Tall Ships (Altaj Ŝipoj) 2000" estas la nomo de la ĉi-jara evento, kiu konsistas el konkursoj kaj kunaj krozadoj ĉirkaŭ la norda Atlantiko. La konkursoj komenciĝis per eŭropa konkurso dum malfrua aprilo ĝis frua majo, kiam la ŝipoj konkurse velveturis de Southampton kaj Ĝenovo al Kadizo. Poste, ili konkursis al la Bermudoj, de tie ili kune velis laŭ la usona marbordo ĝis Bostono, kaj poste konkursis al Halifakso. Dum la fina parto ili konkursis de Halifakso ĝis Amsterdamo por alveni malfrue en aŭgusto. Almenaŭ duono el la ŝipanaro de ĉiu ŝipo devas konsisti el junuloj kun aĝo inter 15 kaj 25 jaroj, kaj ĉirkaŭ 3000 junuloj de pli ol 12 landoj partoprenis en almenaŭ parto de la evento. Sur tro plena aŭtobusa veturo hejmen de mia laborejo, mi parolis kun viro el Bermudo, kies filo jam velveturis en la japana Akogare de la Bermudoj ĝis






Halifakso. Alia filo jam enŝipiĝis sur Concordia de Halifakso al Amsterdamo. Du grandaj pasaĝerŝipoj venis al Halifakso por vidi la velŝipojn, la grandegan Carnival Destiny kiu alvenas ĉiusemajne tra la somero, kaj M.S. Deutschland kiu vojaĝis de Germanio al Nov-Jorko. Post kelkaj tagoj mi aŭdis ke la pasaĝeroj sur tiu konkorda aviadilo kiu falegis en Parizo volis flugi al Nov-Jorko por krozi sur Deutschland. Multaj miloj da homoj venis amase al la havenkvartalo por vidi la grandan nombron de imponaj kaj belaj velŝipoj. Por klarigi kial tiom multaj homoj tiom interesiĝis pri tiuj ŝipoj estas malfacile, krom pro la nekutimeco de la vidaĵo. La „Parado de Veloj" je la lunda mateno kiam la ŝipoj velveturis for al Amsterdamo estis miriginda. Estis la unua fojo ekde 1984 ke tiom da velŝipoj paradis en la haveno de Halifakso kaj, kiel en 1984 (malgraŭ malbona veterprognozo), la vetero estis belega. La mastoj kaj ŝnuroj kaj veloj de la ŝipoj pensigis pri kiel la haveno devis aspekti antaŭ jarcento. Inter la pli grandaj (klaso A) ŝipoj, Kruzenshtern de Rusio jam estis ĉi tie en 1984 kaj denove ĝi estis la plej granda ŝipo (104,2 metroj). Kaiwo Maru (Reĝo de la maro) de Japanio (94,3 m) estis la plej alta de la altaj ŝipoj. Mir (paco) de Rusio kaj Dar Młodziezy (Donaco de la junuloj) de Pollando (ambaŭ 94,8 m) estis konstruitaj dum la 1980-aj jaroj en Gdansko. Libertad de Argentino (90,9 m) kaj Esmerelda de Ĉilio ambaŭ estas ankaŭ metalaj blankaj ŝipoj, sed Amerigo Vespucci de Italio (82,3 m) kun nigraj kaj blankaj strioj estas tre bele konstruita ŝipo el ligno. La marbord-gardistan kutron Eagle (Aglo) de Usono oni konstruis kaj lanĉis en Germanio tuj antaŭ la fama militŝipo Bismarck. Oni simple ne povas mencii ĉiujn el la belaj kaj interesaj ŝipoj, kiel la kliniĝinta Pride of Baltimore (Fiero de Baltimoro), la Lord Nelson kiun oni ekipis por handikapitoj, eĉ por tiuj en rulseĝoj, la glata nederlanda skuno Eendracht (Unuiĝintaj ni staras), la bela Gloria de Colombio kaj Pogoria de Gdynia. Ĉi tiuj kaj multaj aliaj velŝipoj paradis maren el la haveno de Halifakso lundon la 24-an de julio, kaj malmulton de laboro faris tiuj kiuj povis vidi la havenon de la laborejo aŭ kiuj forlasis la oficejon dum kelkaj horoj.

Post kelkaj tagoj, Arung Samudera de Indonezio devis turni por reveni al Halifakso post kiam masto frakasiĝis en ŝtormo. La aliaj aŭ vizitas havenojn en Nova Skotio aŭ ekiris al Amsterdamo. Tiuj kiuj havas aliron al la interreto povas vidi pli da informo, plejparte en la angla lingvo, ĉe ĉi tiuj adresoj: www.tallships2000.com, www.tallships2000.ns.ca kaj www.halifax.cbc.ca/tallships2000/main.html.

Aliaj allogaj eventoj jam okazis en Nova Skotio aŭ okazos dum ĉi tiu somero. La Festivalo de Stan Rogers ĉe Canso (de la 30-a de junio ĝis la 2-a de julio) nun estas ĉiujara muzika festivalo kiu celebras la vivon kaj muzikon de Stan Rogers (1949-1983), fama kantisto de baladoj kaj popolstilaj kantoj kiu mortis ege tro frue dum aviadila akcidento antaŭ 17 jaroj. Ankaŭ okazas tra la somero centoj da eventoj kiel omaraj vespermanĝoj, teatraĵoj, rekuniĝoj kaj tagoj por „reveni hejmen", floro-festivaloj kaj aliaj muzik-festivaloj kiuj reliefigas keltan, popol-violonan, popolan, akadianan, internacian, grekan, hindujan, ĵazan, bluherbejan kaj kamparanan muzikojn. La ĉiujara novskotia internacia tamburada



vesper-torĉa procesio (de la 29-a de junio ĝis la 7-a de julio) estis prezentado de militaj muzikistaroj kun sakŝalmoj, tamburoj, latunaj kornoj kaj multaj aliaj prezentistoj en granda halo. La internacia festivalo de stratprezentantoj (de la 3-a ĝis la 13-a de aŭgusto) allogas milojn da homoj al la urbocentro por vidi talentajn kaj diversajn muzikistojn, ĵonglistojn kaj rakontistojn kiuj prezentas sin sur la stratoj. Dum septembro, alia festivalo celebras la historion de skotaj enmigrantoj kiuj alvenis la 15-an de septembro 1773 al Pictou sur la ŝipo Hector. La 16-an de septembro ĉi-jare oni lanĉas kopion de tiu Hektoro en la haveno de Pictou.

Ankaŭ dum septembro okazos la ĉiujara internacia aviadil-spektaklo de Shearwater, kiam oni povas vidi en la halifaksa regiono diversajn aviadilojn, plejparte militajn kaj kelkajn tre modernajn, rapidajn, bruajn aŭ grandegajn surgrunde kaj en la aero.

Tiu estas nur gusto de tio, kio okazas dum la somero en Nova Skotio. Por pli da informo, oni aŭ legu la retpaĝojn menciitajn, kiuj havas ligojn kun aliaj fontoj de informo, aŭ oni venu kaj revenu al Nova Skotio por mem ĝui la etoson kaj la eventojn de la somero.

— Bob Williamson

## ŜERCAJ RIMARKOJ

Ĉu ateisto povas aĉeti asecurecon kontraŭ "agoj de Dio"?

Mi opinias, ke kvin el kvar homoj trovas frakciojn malfacilaj.

Mi ne havas bonan solvon, sed mi admiras vian problemon.

Se metala fajfilo estas farita el metalo, el kio oni faras nebul-hupo?

Ĉu laboristoj ĉe firmao Lipton (mondfama te-vendisto) paŭzas por trinki kafon?

Sur formularion por akiri aŭtomobil-kondukpermesilon oni devas priskribi la hararkoloron. Kion tutkalvulo skribu?

Se hodiaŭ la temperaturo estas nulo, kaj morgaŭ estas duoble pli malvarma, kio estos la temperaturo?

Kial gluaĵo ne fiksas sin al la interno de la botelo?

☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺

## RICEVANTOJ DE *INTER NI*

Manoel dos Santos, Muritiba, Brazilo

Marjorie Boulton, Oxford, Britio

Draguŝko Petrov, Sofia, Bulgario

Vasil Vutov, Sofia, Bulgario

K. Zalozne, Troubky, Ĉeĥa Respubliko

Manfred Scholz , Jena, Germanio

Eventoj, Budapeŝto, Hungario

Károly Fajszi, Budapeŝto, Hungario

D-ino Julia Horváth, Budapeŝto, Hungario

S-ino Banyai Laszlóné, Budapeŝto, Hungario

Ethel Alexander, North Sannich, BC, Kanado

Connie Clark, Upper Rawdon, NS, Kanado

Azele Deveau, NS, Kanado

Ges-roj du Temple, North Sannich, BC Kanado

Esperano Rondo de Toronto, ON, Kanado

Esperanta Societo Kebekia, Kanado

Geoffrey Greatrex, Halifax, NS, Kanado

Merle Haltrecht-Matte, Orleans, PQ, Kanado

Kim Keeble, Upper Rawdon, NS, Kanado

Gene Keyes, Halifax, NS, Kanado

Myra Larsen, Sannichton, BC, Kanado

Steĉjo Norvell , Halifax, NS, Kanado

Reni Porter, Halifax, NS, Kanado

Jean Smythe, Nanaimo, BC, Kanado

H. Stuckstedte, Kanata, ON, Kanado

Bob Williamson, Dartmouth, NS, Kanado

David Winters , Halifax, NS, Kanado

Radio Polonia, Varsovio, Pollando

Zsuzsa Barabas, Oradea, Rumanio

Stefan Budahazy, Oradea, Rumanio

Janos Csapó, Oradea, Rumanio

Antal Farkas, Oradea, Rumanio

Jozefo L. V. Lenkei, Oradea, Rumanio

Constantine Marku, Braŝov, Rumanio

Loránd Monosi, Oradea, Rumanio

Attila Makay, Oradea, Rumanio

Feliĉia Roman, Oradea, Rumanio

Prof. Simon Ladislaŭ, Oradea, Rumanio

Irene Szücs, Oradea, Rumanio

Olimpia Zaiţ, Cluj, Rumanio

Helena Seres, Vlĉany, Slovakio

Prof. Léo Kpakpo-Koumi Y. Adovi, Lomé, Togo

Edwin Grobe, Tempe, AZ, Usono

Edwin Harler, Levittown, PA, Usono

Charlotte Kohrs, San Diego, CA, Usono

League of East Gulf Esperantists, Berkeley, CA, Usono

Anĝelina Tarmeni, Scottsdale, AZ, Usono